



PILO-PRESS

Internacia Informservo

N-ro 42/72 - 27 dec 1972
Aperas ĉiusemajne

Jarabono 1973

20,-- GM

=====
Pŝk. Nürnberg
819 56 - 851

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

D-ro Werner Bormann, prezidanto de GEA

Bona 1973 estas laborriĉa 1973

Dum la pasinta jaro pluraj revuoj — inter ili ankaŭ kaj unuavice Germana Esperanto-Revuo — publikigis artikolojn, en kiuj gvidaj esperantistoj disputis pri la plej sukcesa vojo por la Esperanto-movado. Ne mankis membroj, kiuj vidis en tiuj disputoj iun aĉan kvereladon kaj konsilis al la aŭtoroj, elbatali siajn diferencojn malantaŭ fermitaj muroj. Mi trovas tiun proponon tute malgusta Nekontesteble ekzistas pluraj vojoj, sur kiuj la Esperanto-movado povas alproksimiĝi al sia celo — se nur estus sole unu, ĉiuj scius precize, kion la estonteco alportos, kaj tio estas sensenca aserto. Sed se vere eblas pluraj vojoj, ni devas diskuti por eltrovi la pli taŭgajn. Tio estas la demokrata metodo. Ankaŭ kiam temas pri la plej taŭga vojo por nia ŝtato Germanio, homoj disputas. Brandt proponas, Barzel kontraŭas, Scheel subtenas, Strauß atakas, Schmidt rebatas ktp. Ĉu ili en la federacia parlamento „kverelas“? Nomu kiel vi volas; tiuj vortaj bataloj estas esencaj en demokratiaj socioj kaj asocioj. Kiu indignite forturniĝas, toleru la demandojn pri sia kompreno de demokratio. La formo kaj tono, nu ja, same kiel en ĉiuj liberaj parlamentoj de la mondo ankaŭ en niaj vicoj ne ekzistas nur trankvilaj anĝeloj. Ni unuanimiĝu: disputo necesas, la formoj estu ĝentilaj. Kiel oni diras en la al Esperanto najbara latina: suaviter in modo, fortiter in re (milde en la maniero, forte en la afero).

Inter la disputpunktoj okupas lokon la demando pri la signifo de la laboro de landa asocio. Mi estas firme konvinkita, ke landaj asocioj estas elstare gravaj, ĉar ili estas la infanterio de la movado, la batalantoj en la tranĉeoj, ĉe la fronto. En la revuo „esperanto“ mi proponis, enŝovi en nian organizon skemojn apud UEA, landaj asocioj kaj lokaj societoj la plurnaciajn agadojn kaj la regionan laboron, ĉar „el kvin etaĝoj la fortikaĵo Esperanto povas pli multe pafi ol el nur tri“. Ke mi ofte uzas ekzemplojn por la Esperanto-laboro el la militista kampo, ege mirigis min, kiam mi antaŭ kelka tempo tion konstatis! Kial mi, pacema homo (kaj tial esperantisto) aplikas tian militistan terminaron? Ioma psikologia enketado en mi mem klarigis al mi, ke fono de la komparo estas la konvinko pri la absoluta neceso de agresema esperantisteco. Nun neniu esperantisto direktu agresemon kontraŭ alia samideano, sed la ekstera mondo, la homoj fermentaj siajn okulojn antaŭ la ekzistanta fenomeno Esperanto, estu alparolataj, informataj. Kiom ajn agraba estas la bela klubvivo, la bierumado kaj la raveco de la montritaj diapozitivaj: tio ne antaŭenpuŝas Esperanton! Ni turnu nian aktivecon eksteren. Ek kontraŭ la inerta mondo.

Bonvolu ne miskompreni min. En mia libro „Bona Ŝanco“ mi skribis: „Oni povas en blinda idealismo, je tiu kontraŭ muro en la espero, iam povi trapaŝi ĝin. Ekonomia kaj racia tio ne estas. Pli bone tiu laŭdinda idealismo estas aktivigita kune kun racia idealismo“ (paĝoj 77/78). Ni agu aktive, ni agu multe, sed

racie, prefere surbaze de plano. La estraro de GEA havas tian laborplanon, kiu estis akceptita dum la Germana Esperanto-Kongreso 1967 en Hamburgo (vidu en GER 1967, paĝoj 76/77). Ĉerte ni devas alĝustigi ĝin nun. Ĉar dum la jarĉefkunveno en Luksemburgo ĉiukaze estos detalaj diskutoj (disputoj?) pri nia politiko por Esperanto, la jaro 1973 estas tute taŭga por revizii la laborplanon de GEA. Samjare ankaŭ UEA volas akcepti novigitan laborplanon, kio estas bona tempa koincido.

La gvidprincipo devas esti: pli da aktivecoj direktitaj al eksteraj (neesperantistaj) instancoj. Tio ne estas afero de serĉado de temoj, sed afero nur de niaj laborfortoj. Ju pli da aktivaĵoj, des pli da aktivado — tio estas la facilega tamen vera formulo! Nia handikapo estas nia tempomanko, la profesiaj devoj de ni ĉiuj. Ideala estus kunlaboranto sen tiu premo, do iu aktivulo, kiu povas sin entute dediĉi al Esperanto. Se GEA povus dungi kapablulon, ni farus: salton antaŭen, en nia peza laboro. Sed dungi signifas pagi, kaj pagi nur eblas surbaze de kotizoj aŭ donacoj. Ĉu eblos, ke germanaj esperantistoj nekapablaj mem pli labori por Esperanto donus parton de sia profesia laboro al Esperanto per la ĉirkaŭvojo de donacita monsumeto el tiuj profesiaj enspezoj? De GEA salajrata oficisto savus nin el multaj malfaciloj. Ni pripensu tion kaj se iel eble ekiru tiun vojon. Ĉiu sentu la devon pli labori por Esperanto, kaj kiu ne povas, elaĉetu sin el tiu devo per mondonacoj por dungitio.

Elradij informojn pri Esperanto estas ĉies konstanta devo. Sed mi volas rezigni la admonon, ke ĉiu varbu ĉiujare unu novan membron (matematike en 1988 ĉiuj enloĝantoj de Germanio estus esperantistoj); tio ne funkcias. Restas unu peto: aktivado en via regiono. Informadu la gazetaron, radion kaj televidon; kaj se ili pretas raporti nur pri io okazanta, okazigu ion, nome regionan konferencon, ĉar preskaŭ ĉiam la loka esperantistaro ne estas sufiĉe forta. La federacia respubliko estas kovrata de reto el regionaj ligoj, nia „liter-salato“ kiel NOGELO, SOBELO kaj aliaj. Kunhelpu doni pli da vivo al ili, kaj la ĉefa vivsigno de ĉiu el ili estu unu grandskale eĉ pompe organizita regiona konferenco. Ni havas ok tiajn ligojn. Tio signifas ok okazojn por demonstracii la vivantecon de Esperanto.

Plus la nacia kongreso (1973 en Luksemburgo, ĉiu bonvolu partopreni!) kaj la vaste etendiĝanta eĥo de la Univerŝala Kongreso, tiuj estas jam 10 kaŭzoj por informado al la publiko. Min plej malagrabla tuŝas el ĉiuj kontraŭargumentoj pri nia afero la ŝajnkonstato, ke Esperanto estas „kulturhistoria fenomeno“ (laŭ Frankfurter Allgemeine Zeitung 5 marto 1963; „historio“ = pasinteco). Ne, Esperanto vivas, kaj ni montru tion. Ĉiu el ni, en la centraj instancoj de GEA kaj en la regionaj ligoj, montru tion per nia laboro. En 1973 ni devas multe pli labori ol ĝis nun, kaj nur se la jaro estos laborriĉa, ĝi estas bona jaro por ni.



Tria bulteno

La Eŭropa Kongreso de Esperanto Pentekoston 1973 en Luksemburgo celas kunveni la landajn asociojn de la Eŭropa Ekonomia Komunumo: Belgujo, Britujo, Danlando, Francujo, Federacia Respubliko Germanujo, Irlando, Italujo, Luksemburgio kaj Nederlando. Dum la kongreso kelkaj el ili (ankaŭ GEA!) aranĝos sian oficialan jarĉefkunvenon. La aliaj estas invititaj sendi delegaciojn. La prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, komunikis, ke li partoprenos la kongreson.

La provizora programo — publicita en la lasta numero de GER — dediĉas du trionojn de la kongresa tempo al la komunaj, internaciaj aranĝoj. La internaj kunvenoj de la landaj asocioj okazos nur dum parto de sabato.

Kotizoj: Ekde la 1a de januaro 1973 validos la jenaj kotizoj: Kongresano 19,— GM, geedza paro 29,— GM, lernanto kaj studento ĝis 25jara 7,— GM. Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon.

Aliĝoj: Aliĝojn kaj pagojn por la kongreso akceptas la ĝenerala sekretario de GEA, Hermann Schmid, 89 Augsburg, Bebo-Wager-Straße 8. Kongresajn pagojn bonvolu ĝiri al Hermann Schmid, Sonderkonto, Post-scheckamt München 2643 71 aŭ Stadtparksparkasse Augsburg 0 111 096. Aliĝilon enhavis GER 6/72; ankaŭ en la sekvonta numeroj vi trovos aliĝilon.

Loĝado: Mendilo por hotelĉambroj troviĝas apud la aliĝilo. La turisma oficejo de Luksemburgo akceptos mendojn nur ĝis la 31a de januaro 1973. Hermann Heiß
GEA-estrarano pri kongreso

Jarfine

Per ĉi tiu numero finiĝas la dua jarkolekto de Pilo-Press kaj samtempe finiĝas la jaro 1972. Pilo-Press deziras al ĉiuj legantoj, abonantoj kaj amikoj bonan, sukcesplenan NOVAN JARON 1973.

Sur la titola paĝo estas legeblaj la vortoj de d-ro Werner Bormann, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kiuj aperos en la numero 8/72 de Germana Esperanto-Revuo. Tiu artikolo donas la perspektivon de la germana Esperanto-movado por la jaro 1973.

Pilo-Press volas servi al la Esperanto-movado. 1972 estis laborriĉa. Kvankam ne ĉiuj planoj realigis, tamen oni povas diri, ke 1972 estis bona jaro. Laboro ankaŭ ne mankos por la jaro 1973.....

La unua numero 1973 de Pilo-Press aperos la 3an de januaro 1973.

UK Beogrado 1973

Ekde la 1a de januaro 1973 validas por la 58-a Universala Kongreso de Esperanto en Beogrado jenaj kotizoj:

- 1) Kongresano ne membro individua de UEA 101,-- GM
- 2) Kongresano individua membro de UEA kun jarlibro (MJ) 85,70 GM
- 3) Kongresano individua membro de UEA kun jarlibro kaj revuo Esperanto (MA) 70,40 GM
- 4) Edz(in)o de kongresano en kategorio 1 70,70 GM
- 5) Edz(in)o de kongresano en kategorio 2 aŭ 3 58,85 GM
- 6) Junulo ĝis inkl. 20-jara 30,30 GM
- 7) Universitata studento ĝis inkl. 30-jara 50,50 GM
- 8) Blindulo 40,40 GM

Aliĝojn akceptas la kongresa peranto: Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113. Petu aliĝilon!

Aĉetu ankaŭ la kongresanglumarkon: 1 folio kun 10 markoj -,60 + -,25 afranko = -,85 GM

Europa Kongreso 1973

Ĝis la 24 dec 1972 aliĝis 65 kongresanoj el FRG! Ekde la 1a jan 73 validas novaj kongresaj kotizoj. Vidu la titolan paĝon!

Varbu por la Luksemburga kongreso! Aĉetu kaj uzu la glumarkon! Mendu ĉe Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg!

Esperanto-kursoj por lernantoj

Augsburg (PP) Gerald Tucker instruas Esperanton al 61 lernantoj de la ĉeflernejo (hauptschule) de Schwabmünchen. La du kursoj okazas en lingvolaboratorio. Ankaŭ en la mezlernejo de Miltenberg okazas Esperanto-kurso. Gvidas ĝin Kurt Fischer.

Informado kostas monon! Subtenu la informadon!

Abonu al Pilo-Press 1973